

74
2007


4^{me} Année, N^o 1.
Septembre 1905 (N^o 37)

4^a Jaro, 1^a Numero.
Septembro 1905 (N^o 37)

4^e Jaar, N^o 1.
September 1905 (N^o 37)



GAZETO ESPERANTISTA BELGANTA CIUMONATE EN BELGUJO.



LA BELGA SONORILO

JOURNAL ESPÉRANTISTE BELGE
MENSUEL.

BELGISCH ESPERANTISCH
MAANDSCHRIFT.

Oficiala Organo de la « Belga Ligo Esperantista »
kaj de la Belgaj Ligaj Grupoj.
Aliginta al la Unuigo de la Perioda Belga Gazetaro.

Organe officiel de la « Ligue Esperantiste Belge »
et des Groupes Belges Affiliés.
Affilié à l'Union de la Presse Périodique Belge.

Officieel orgaan van den « Belgischen Esperantischen Bond » en
der Belgische aangesloten Groepen.
Aangesloten bij het Verbond der
Belgische periodische Nieuwsbladen.

DIREKTORO : DOKTORO M. SEYNAEVE.
REDAKTORO-ADMINISTRANTO : J. COOX, DUFFEL (Belgujo).

Prix des Abonnements :

Abonnement simple (au moins 1 an)	4,00 fr.
Avec inscription à la Ligue	5,00 fr.
Membre protecteur de la Ligue avec abonnement (Voir Statuts p. II)	au moins 10,00 fr.
En numéro	0,40 fr.
Collections des trois premières années	chacune 5,00 fr.
pour l'étranger	6,00 fr.

Inschrijvingsprijs :

Enkele inschrijving (ten minste 1 jaar)	4,00 fr.
Met inschrijving in den Bond.	ten minste 5,00 fr.
Bond-Beschermer (maandschrift inbegrepen, zie Standregelen, p. II)	ten minste 10,00 fr.
Een nummer	0,40 fr.
De drie vorige jaren	ieder 5,00 fr.
Buitenland	6,00 fr.

A BONOJ : 4 fr. ĉiujare. — Unu n^o 0,40. — Kolektoj de antaŭaj jaroj, ĉiu 6,00 fr.

La date initiale de l'abonnement est le 1^{er} Septembre. — Si
l'on s'abonne dans le courant de l'année, on reçoit les Nos
de l'année déjà parus.

Het jaar begint den 1^{en} September. — Indien men inschrijft in
den loop des jaars, ontvangt men de vorige nummers.

Adresser les abonnements, manuscrits,
annonces, etc., à :

Sendu abononjn, manuskriptojn, anon-
cojn, k. t. p. al :

Inschrijvingen, handschriften, annon-
cen, enz., te zenden aan :

S^{ro} J. COOX, DUFFEL (Belgujo).

ENH AVO.
(Sommaire. — Inhoud.)

Al la Belgaj Esperantistoj.
Al ĉiuj amikoj de La Belga Sonorilo.
Kelkaj vortoj pri la nova Redakcio.
Eĥoj de la Kongreso.
El la parolado de D^{po} Zamenhof.
Diversaĵoj.

Kroniko Belga. — Eksterlando.
Esperanto en Kongreso de Mons.
Konkurso Hachette.
Franca-Flandra Fako.
Alvoko al la Belgaj Esperantistoj.
Belga Ligo Esperantista.

A.-J. WITTERYCK-DELPLACE,

IMPRIMEUR-ÉDITEUR

BRUGES. NOUVELLE PROMENADE. 4.

DRUKKER-UITGEVER

BRUGGE, NIEUWE WANDELING, 4.

Belga Ligo Esperantista

Ligue Espérantiste Belge.

Belgische Esperantische Bond.

COMITÉ EXÉCUTIF.

UITVOEREND KOMITEIT.

Président (Voorzitter) : M. le Commandant CH. LEMAIRE.

Secrétaire Général (Algemeene Schrijver) : M. le D^r M. SEYNAEVE, Heule-Courtrai.

Secrétaire Administratif (Bestuur-Schrijver) : M. J. COOX, Duffel.

Membres (Leden) M^{lle} E. LECOINTE, MM. L. BLANJEAN, Jos. JAMIN, L. JAMIN, VAN DER BIEST-ANDELHOF, D^r R. VAN MELCKEBEKE.

Pour tous renseignements, adhésions, envois de rapports, etc., s'adresser au Secrétaire-Administratif :

Voor inlichtingen, inschrijvingen, opzending van verslagen, enz., zich wenden tot den Bestuur-Schrijver :

* M^r J. COOX, DUFFEL. *

EXTRAIT DES STATUTS :

ART. 1. — Il est fondé sous le titre de **Ligue Espérantiste Belge** (*Belga Ligo Esperantista*) une société des adeptes et des approbateurs de l'Espéranto en Belgique.

ART. 2. — La Ligue Espérantiste Belge a pour but de propager la langue auxiliaire internationale Espéranto, en dehors de toute question politique ou religieuse, et d'étendre les relations de la Belgique avec l'étranger.

ART. 3. — Pour atteindre ce but, la Ligue crée un fonds social pour aider les groupes Espérantistes, assurer l'existence de l'organe officiel de la Ligue, éditer et répandre des imprimés de propagande, organiser des conférences, des cours et des expositions espérantistes, et réaliser ou aider à réaliser tout projet qui, après mûr examen de la part du comité, aura été reconnu utile.

ART. 5. — Les cotisations des membres sont fixées comme suit :

a) Tous les membres de la Ligue paient une cotisation annuelle minima de 1 fr. ou versent une fois pour toutes une somme de 25 francs.

b) Les membres qui paient une cotisation annuelle d'au moins 10 francs, ou qui versent en une fois la somme de 200 francs, reçoivent le titre de *Membre Protecteur*.

c) Les membres, qui paient une cotisation annuelle d'au moins 25 francs ou qui versent en une fois la somme de 500 francs, sont nommés *Bienfaiteurs de la Ligue*.

Aux Membres Protecteurs et Bienfaiteurs la Ligue sert de droit l'organe officiel.

ART. 12. — Une assemblée générale de la Ligue a lieu chaque année. A cette réunion le Comité présente entre autres un rapport sur l'activité de la Ligue et la gestion financière de l'année écoulée.

Les membres absents ne peuvent voter que pour l'élection des membres du Comité.

L'ordre du jour est envoyé aux membres au moins 10 jours avant l'assemblée.

ART. 13. — La Ligue choisit comme organe officiel la revue *La Belga Sonorilo*. Cette revue est complètement indépendante de la Ligue. Elle imprime les rapports, avis, communications et autres documents que lui envoie le Comité de la Ligue. Elle publie une fois les noms de tous les membres de la Ligue et dans chaque numéro les noms des membres du Comité d'Honneur.

Uittreksel der Standregelen.

ART. 1. — Onder den titel «**Belgische Esperantische Bond**» (*Belga Ligo Esperantista*), is een Bond gesticht tusschen de personen welke in België het Esperanto beoefenen of goedkeuren.

ART. 2. — De Belgische Esperantische Bond heeft voor doel buiten alle politieke of godsdienstige strekking, de Hulpwereldtaal Esperanto te verspreiden en de betrekkingen van België met het buitenland te bevorderen.

ART. 3. — Om dit doel te bereiken sticht de Bond een geldfonds ten einde de Esperantische groepen te helpen, het bestaan van het officieele blad van den Bond te verzekeren, allerhande propagandaschriften uit te geven en te verspreiden, Esperantoleergangen, voordrachten en tentoonstellingen in te richten, en alle ontwerpen welke na rijpe overweging van het Bondsbestuur voordeelig blijken, te verwezenlijken of aan de uitvoering ervan mede te werken.

ART. 5. — De bijdragen der leden zijn vastgesteld als volgt:
a) Alle leden betalen eene jaarlijkse bijdrage van ten minste 1 fr. ofwel storten eens voor al de som van 25 fr.

b) De leden welke eene jaarlijkse bijdrage van ten minste 10 fr. ofwel de som van 200 fr. in eens storten, worden opgenomen als *Beschermleden*.

c) De leden welke eene jaarlijkse bijdrage van ten minste 25 fr. ofwel 500 fr. in eens geven, verkrijgen den titel van *Weldoeners van den Bond*.

De *Beschermleden* en de *Weldoeners* ontvangen kosteloos van wege den Bond het officieel blad.

ART. 12. — De algemeene vergadering van den Bond geschiedt jaarlijks. In deze vergadering geeft het komiteit onder andere verslag over zijne werking en over de uitgaven van het verleden jaar. De afwezige leden mogen per brief stemmen maar dit slechts voor de te kiezen komiteitsleden.

De dagorde wordt ten minste tien dagen vóór de vergadering aan de leden gezonden.

ART. 13. — De Bond neemt als officieel orgaan het blad «*La Belga Sonorilo*».

Dit blad is gansch onafhankelijk van den Bond. Het neemt alle verslagen, berichten, mededeelingen en andere stukken op welke het van het Bestuur van den Bond ontvangt. Het kondigt eenmaal de namen aller leden af en vermeldt in ieder nummer de namen der leden van het Eerekomiteit.

4^{me} Année, N^o 1.
Septembre 1905 (N^o 37)

4^o Jaro, 1^a Numero.
Septembro 1905 (N^o 37)

4^o Jaar, N^o 1.
September 1905 (N^o 37)

GAZETO ESPERANTISTA ELIRANTA ĈIUMONATE EN BELGUJO.



Oficiale Organo de la «**Belga Ligo Esperantista**»

kaj de la Belgaj Ligaj Grupoj.

Aliginta al la Unuigo de la Perioda Belga Gazetaro.

Organo officiel de la «**Ligue Espérantiste Belge**» et des
Groupes Belges Affiliés.
Affilié à l'Union de la Presse Périodique Belge.

Officieel orgaan van den «**Belgischen Esperantischen Bond**» en der
Belgische aangesloten Groepen. — Aangesloten bij het Verbond
der Belgische periodische Nieuwsbladen.

DIREKTORO : DOKTORO M. SEYNAEVE.

REDAKTORO-ADMINISTRANTO : J. COOX, DUFFEL (BELGUJO).

Al D^{ro} L. Zamenhof, honorita de la Franca Landestraro per la ordeno de la Honora Legio, al nia glora kaj amata majstro, «**La Belga Sonorilo**» prezentas respektplenajn gratulojn.

Al ĉiuj Esperantaj Jurnaloj !

La nova redakcio de la «**BELGA SONORILO**» tre insiste petas ĉiujn Esperantajn kunfratojn ke ili bonvolu korekti en siaj jurnaloj la sciigojn koncernantajn la B. S., laŭ la ŝanĝoj montrataj sur la kovrilo :

1. La abonkosto de nia revuo estas de nun por ĉiuj landoj : 4 fr.

2. La nova adreso de la Administracio de nia revuo estas : S^{ro} J. Coox, Duffel (Belgujo).

Por transdonoj de abonoj, sendoj de komunikadoj kaj manuskriptoj, petoj pri sciigoj, anoncoj, k. c., oni sin turnu al la suprenomita Administracio. Por ĉiuj ĝeneralaj principaj demandoj koncernantaj la lingvon, la gazetaron, k. c., oni sin turnu al la Direkcio : D^{ro} M. Seynaeve, Heule-Courtrai.

De nun do, oni nenion plu pri la ĵurnalo sendu nek al S^{ro} J. Jamin nek al S^{ro} L. Vandersleyen.

LA REDAKCIO.

Al la Belgaj Esperantistoj

de Kom^{to} Ch. LEMAIRE.

Okaze de mia reveno en mian landon, mi petas miajn esperantistajn amikojn ke ili akceptu miajn korajn dankojn pro la helpo kiun ili donis al nia grava afero dum mia foresto.

Mi estas treege danka al S^{ro} Jamin pro tio ke li havigis al la « *Belga Sonorilo* » lokon rimarkindan inter la esperantista gazetararo.

Pro sia sindono li ofte forlasis siajn proprajn utilojn, kaj nun devo estas ke mi liberigu lin de la tasko kiun li tiel bone plenumis dum pli ol 3 jaroj, kvankam li estis promesinta tion fari nur dum 18 monatoj.

Sinjoro Jamin kaj mi, ni komisiis hodiaŭ nian amikon D^{on} Seynaeve por ke li direktu la « *Belga Sonorilo* ».

Ne povante transdoni al aliaj personoj miajn laborojn pri Afriko, mi povas nur rediri al Jamin kaj Seynaeve kiom mi ŝatas ilian nelaceblan sindonemon, ilian memforgesemon, ilian malprofitemon.

Tutkore, dankon al ambaŭ, kaj ankaŭ al iliaj sindonaj kunlaborantoj S^{oj} L. Blanjean kaj L. Vandersleyen.

Mi ne dubas ke niaj partianoj konservos por la unua Direktoro de la *Belga Sonorilo* daŭran memoron kaj ke ili sekvos samfide la novan kondukiston.

Ili pardonu min ĉar mi restos flanko, kvankam mi restos kapitano montranta la direkton, laŭ kiu la nova piloto gvidos nian barkon.

Kom^{to} CH. LEMAIRE.



Aux Espérantistes de Belgique

PAR LE COMM^e CH. LEMAIRE.

A l'occasion de mon retour au pays, je prie nos amis espérantistes de recevoir mes cordiaux remerciements pour l'aide qu'ils ont, pendant mon absence, apportée à notre grande cause.

Je suis profondément reconnaissant à M. Jamin d'avoir assuré à la « *Belga Sonorilo* » une place remarquable dans la presse espérantiste.

Son dévouement lui a fait oublier souvent ses propres intérêts, et il m'appartient aujourd'hui de le relever du poste qu'il a si dignement occupé pendant plus de 3 ans, alors que je n'avais sa promesse que pour 18 mois.

M. Jamin et moi confions aujourd'hui la conduite de la *Belga Sonorilo* à notre ami, le docteur Seynaeve.

Pour moi, qui ne puis remettre à d'autres mes travaux africains, je ne puis que redire à Jamin et à Seynaeve combien j'apprécie leur inlassable dévouement, leur abnégation, leur désintéressement.

De bon cœur merci à tous deux, ainsi qu'à leurs dévoués collaborateurs, MM L. Blanjean et L. Vandersleyen.

Je ne doute pas que nos partisans garderont au premier directeur de la *Belga Sonorilo* un souvenir constant, et qu'ils suivront le nouveau pilote avec le même entrain.

Ils me pardonneront de demeurer dans l'ombre bien que gardant le rôle de capitaine, et donnant l'orientation suivant laquelle le nouveau pilote guidera notre barque.

Comm^e CH. LEMAIRE.

Aan de Belgische Esperantisten

DOOR KOMM^e CH. LEMAIRE.

Ter gelegenheid van mijne terugkomst in het land, verzoeke ik mijne Esperantistische vrienden mijne hartelijke dankzeggingen te willen aanvaarden voor de medehulp, die zij gedurende mijne afwezigheid aan onze groote zaak hebben verleend.

Ik ben den Heer Jamin diep erkentelijk, omdat hij gedurende mijne afwezigheid aan de Belga Sonorilo eene merkwaardige plaats in de Esperantistische pers heeft verzekerd.

Zijne toewijding heeft hem dikwijls zijne eigen belangen doen vergeeten, en het is aan mij hem af te lossen van den post, dien hij zoo waardig gedurende meer dan 3 jaren heeft bekleed, hoewel hij mij slechts voor 18 maanden zijne belofte had toegezegd.

De Heer Jamin en ik, wij vertrouwen heden de leiding van de Belga Sonorilo aan onzen vriend Dr. Seynaeve.

Wat mij betreft, ik kan aan anderen mijne Afrikaansche werkzaamheden niet overlaten, ik kan enkel aan Jamin en Seynaeve herhalen hoe hoog ik hunne onvermoeibare verkleefdheid schat, hunne zelfverloochening en hunne belangloosheid.

Van harte dus, dank aan hen beiden, zoo ook aan hunne wakkere medewerkers de HH. L. Blanjean en L. Vandersleyen.

Ik twijfel er geenszins aan, dat onze partijgenooten den eersten bestuurder der Belga Sonorilo eene bestendige herinnering zullen wijden en dat zij met denzelfden geestdrift den nieuwen stuurman zullen volgen.

Zij zullen mij vergeven dat ik in de schaduw blijf, hoewel de rol van kapitein voor mij houdend en de noodige richting aanduidend, volgens welke de nieuwe stuurman ons schip zal te leiden hebben.

Kommandant LEMAIRE.



Al ĉiuj amikoj de

La Belga Sonorilo!

Nia agema revuo nun eniras la kvaran jaron de sia vivo kaj, laŭ sankta kaj respektinda kutimo, la Redakcio uzas tiun okazon por alrigardi dum kelkaj momentoj la jam faritajn progresojn kaj montri la ankoraŭ trafotajn rezultatojn; por danki la helpintajn amikojn kaj elvoki la fervoron, la subtenon de l' novaj adeptoj.

Antaŭ tri jaroj, en la momento kiam estis fondata ĉi tiu ĵurnalo, Esperanto estis preskaŭ nepre nekonnata en tuta Belgujo, escepte en Bruselo kie la agado de Kom^{to} Lemaire kaj de kelkaj liaj amikoj iom diskonigis la ideon, kaj en Antverpeno kie la ĵusa Esperanta Fako de la Maraja Ekspozicio vekis la atenton kaj bonege preparis prilaboreblan kampou. Sed de tiam, kiom da progresoj! De tiam, kiom da energiaj klopodoj! En ĉiuj flankoj de la lando paroladoj estis farataj, ĵurnalaj artikoloj estis presataj, grupoj estis fondataj; eĉ ne dum unu tago ĉesis la penado: ĉi tie fervora grupo per grandegaj afiŝoj anoncas kursojn, tie alia organizas festojn kaj ekspoziciojn pri kiuj raportas la tuta urba gazetararo; hodiaŭ flandra ilustrata revuo konigas en ĉiuj flandraj vilaĝoj, en ĉiuj vilaĝaj lernejoj nian lingvon kaj ricevas centojn da aprobaj leteroj; la sekvantan tagon, franca universitata profesoro travizitas tutan Belgion kaj resonigas la solenajn universitatajn ĉambregojn per la ejoj de la Zamenhofa lingvo; Esperanto estas instruata al ĉiuspecaj lernantoj: al ĉiugradaj studentoj en la lernejoj, al laboristoj kaj oficistoj en la popolaj universitatoj kaj poliglota kluboj, al religiaj seminarioj kaj monaĥejoj, al malfeliĉaj blinduloj kaj surdmutuloj en iliaj institutoj; kaj, dume, en ĉiu monato, la *Belga Sonorilo* sen ia ĉeso disportas al ĉiuj tiuj malsamaj kuraĝuloj iom da nutraĵo por ilia fervoro, ĉiumonate sonigas en la tuta lando alvokan sonadon al ĉiuj energiaj progresamuloj!

Nun, ŝajnas ke alvenis labora momento por unuigi ĉiujn disajn batalantojn kaj batalionojn de nia belga Esperantista armeo, por ilin ĉiujn kunligi per potenca ligo kiu ne nur povos havigi al ili potencajn armilojn por trafi ilian celon, sed ankoraŭ kiu mem, per propraj fortoj, eniros la batalkampojn kaj certe trapos plej efikajn batojn. Tial, por tiu celo, estis ĵus fondata la « *Belga Ligo Esperantista* », kiu elektis, kiel oficialan organon, nian revuon « *La Belga Sonorilo* ».

De nun do, plifortigitaj per nia nova unuiga organizacio, energie direktotaj de nia senlaciĝa Komandanto Lemaire, sensanceliĝe kaj sentime ni antaŭeniros sur la vojo de l' sukceso. Ĝis nun, « *La Belga Sonorilo* » sola elportis la tutan penadon de la propagando, sola elpasis ĉiujn elspezojn, kvankam ĝiaj enspezoj ne sufiĉis por pagi eĉ la solan ĵurnalan koston; de nun, la « *Belga Ligo* » zorgos pri kaj nur pri la propagando kaj la ĵurnalo povos nepre klopodi per senĉese pliboniĝi kaj pligrandiĝi.


Kuŝas antaŭ ni matura kampo, en niaj manoj ni tenas akriĝitajn laborilojn: Ni ne ripozu, ni ne maluzu la momenton tiel favoran, ni plenbrake alprenu la oran rikolton. Jam de longe forpasis la malfacilaj penoj de la plugado kaj de la semado,

forpasis la batoj de l' kontraŭbatalantaj ventegoj; inter la miloj da ĉiufanken disĵetitaj greneroj, unu falis en bonan teron, kreskis, kaj naskis la fieran arbon, kies riĉaj fruktoj nun maturiĝas: sub ĝia ampleksa branĉaro ni ne senlaboreme kuŝiĝu, sed kun nova kuraĝo ni ĝin perforte skuadu kaj ni deĵetos sennombrajn fruktojn.

La ĵusa famega Kongreso kaj la triumfa vojaĝo de nia Majstro tra Francujo kaj Anglujo en ĉiuj flankoj incitis simpatian scivolemon; la fondo de la « *Belga Ligo* » kaj la subteno de la « *Belga Sonorilo* » ankoraŭ plifaciligas la laboron de la Belgaj propagandantoj: ni sentime montriĝu antaŭ la mondo, ni obstine bataladu, kaj sukceso, certa kaj rapida sukceso, kiel en Francujo, Anglujo kaj Germanujo, tiel en nia kara Belgujo gloros nian penadon.

Vi ĉiuj, progresemaj amikoj de la lingvo internacia, vi kiuj senĉese staris kaj batalis por la ideo, aŭ vi kiuj laciĝis pro la ŝajna nesukceso kaj dubante eliris el niaj vicoj, aŭ vi kiuj nun aliĝas al nia batalantaro, vi ĉiuj alvenu al ni, sub la verdan esperigan standardon, kaj, incitataj per nova kuraĝo, donu al ni vian malavaran helpon. Belgaj amikoj, neniu el vi restadu ekster nia anaro; se ne estas eble al vi mem propagandadi, almenaŭ ne rifuzu kelkajn monerojn al tiuj kiuj sen ia ĉeso, sen ia profito, oferas sian tutan tempon, sian plenan energion por la sukceso de plej homama ideo. Alvenu ĉiuj en nian Ligan rondon, super kiu kaj por kiu nia Belga Sonorilo senlace daŭrigos sonadi la alvokon al ĉiuj progresemaj homoj!

D^{ro} M. SEYNAEVE.



Kelkaj Vortoj pri la Nova Redakcio.

Kiel estas anoncite en la lastaj numeroj, okazis kelkaj ŝanĝoj en la direkto, la redakcio kaj la eksteraĵo de nia revuo. Sed, antaŭ ĉio, mi tuj diru ke nenia malpaco inter la antaŭaj redaktoroj kaŭzis ilin. Kelkaj el niaj amikoj, precipe la antaŭa ĉefredaktoro, S^{ro} J. Jamin, pro personaj kaj profesiaj kaŭzoj, ne plu povas oferi al la ĵurnalo regulan kaj ĉiutagan laboradon, sed ili ĉiuj daŭrigos alporti al ĝi neregulan sed tre sindoneman kunverkadon. Tre ofte do la legantoj povos legi artikolojn verkitajn de S^{roj} J. Jamin, L. Blanjean kaj aliaj.

Sed ankaŭ kun novaj tre lertaj amikoj, jam en ĉi tiu numero, ili konatiĝos. S^{ro} J. Coox, tre fervora kaj agema propagandisto, akceptis la pezan ŝarĝon de l' redaktado kaj de l' administrado; S^o F. de Roy, redaktoro ĉe l' granda Antverpena ĵurnalo « *La Metropole* », kiu tiel multe kunhelpis al nia progresado en Antverpeno, sin okupas precipe pri la franca parto kaj S^{ro} A. Vander Biest-Andelhof, alia tre ŝatinda reprezentanto de la fama Antverpena grupo, pri la flandra parto.

La ĵurnalo ankaŭ iom aliformiĝos. De nun, ĝi enhavos nur tre malmultajn artikolojn tradukatajn france kaj flandre sed ĝi montros apartajn francajn kaj flandrajn artikolojn. Ĝi enhavos, plie, novajn rubrikojn: *Bibliografio* kiu tre serioze analizos kaj taksos la novajn verkojn, *Diversaĵoj* kiu mallonge pritraktos ĉiuspecajn (artaĵn, sciencajn, amuzajn, k. c.) interesajn temojn, *Komunikaĵoj*, *Foŝta kesteto*,

Amuzajoj k. c. (*) Ni ankoraŭ aldonu la ĉiumonatan oficialan raporton de la *Belga Ligo Esperantista*. Post unu aŭ du monatoj, la kovrilo de la revuo duobligos kaj la interna folio, kiu montras resumon de la gramatiko kaj ĉiuspecajn praktikajn informojn por la novaj adeptoj, estos deprenebla kaj servos por propaganda uzado.

Estas espereble ke nia ĵurnalo, kun tia aranĝo, plaĉos ne nur al la belgaj sed ankaŭ al la eksterlandaj Esperantistoj. Ĉar, laŭ internacia vidpunkto, nia revuo, kiu ĝis nun ludis gravan rolon en la diskutado de l' plej gravaj demandoj de nia afero kaj estis rajte kalkulata inter la plej seriozaj kaj kredindaj naciaj gazetoj, daŭrigos tiel agadi kaj regule konigos sian liberan kaj senpartian opinionon pri la ĝenerala kondukado de nia entrepreno.

Pro tiu pligravigo kaj pligrandigo de la ĵurnalo, la abonkosto iom plialtiĝos: ĝi estos 4 frankoj por ĉiuj landoj. Sed sendube neniuj plendoj pri tio, ĉar certe « *La Belga Sonorilo* » fariĝos baldaŭ unu el la plej interesaj Esperantistaj revuoj.

La Direktoro.

(*) Pro manko da loko, ni povos presiĝi nur en la venonta numero la rubrikojn: *Bibliografio, Poŝta Kesteto, Komunikajoj, Amuzajoj.*



Ĉoj de la Kongreso.

La ĵurnalo « *Lingvo Internacia* » dediĉas sian tutan numeron de la 15^a de Aŭgusto al raporto pri la Kongreso. La legantoj tie trovos multajn detalojn kiujn ni ne povas enlokigi en nian revuon, ekzemple la belan paroladon de D^{ro} Zamenhof kiun li legis la 5^{an} de Aŭgusto en la teatro, je la malferma kunsido, la belan raporton de D^{ro} Bein, la diskutojn pri la elparolado, « pri Provizora Lingva Komitato », pri dua kongreso kaj cetere.

Ĉi tie ni skribos ankoraŭ kelkajn detalojn pri la tri lastaj tagoj de l' Kongreso, pri kiuj ni ne parolis en la unua raporto.

La jaŭdon, ĉirkaŭ 300 kongresanoj enŝipiĝis en la vaporsipon « *Onward* » kaj vizitis niajn samideanojn en Folkestone kaj Dover. En tiuj ambaŭ urboj la estraroj kaj la Komercaj Cambroj ricevis la vizitantojn kaj organizis diversajn festojn, festenojn kaj kunvenojn. La kora akcepto de la Angloj daŭrigis, eĉ pligrandigis la entuziasmon kiu naskiĝis en Boulogne.

Aliaj festoj kaj oficiala akcepto atendis la kongresanojn kiam ili elŝipiĝis en Calais, kaj vizitoj, festenoj, koncertoj memoriĝis ke la unua kongreso estis decidita la pasintan jaron en tiu urbo. La sukceso de la Kongreso grandiĝis pli kaj pli, kaj lastan koncerton oni organizis en la teatro de Boulogne, la sabaton vespere. Je la fino de la kunveno, kiam S^{ino} Rosa Junck denove deklamis la belan verkon de S^{ro} Clarence Bicknell, ĉiuj alestantoj bedaŭris ke tiuj frataj kunvenoj tiel baldaŭ finiĝis:

Kaj ni, amikoj karaj, baldaŭ ni disiros,
Sed ne fremduloj plu post tiu ĉi kunsido,
Ĉar Esperanto nin kunligas; ni nur diros:
Ĝis la revido!

S^{ro} kaj S^{ino} Zamenhof, antaŭ la Kongreso, vizitis Berlino'n kie ili pasigis tri tagojn kaj renkontis kelkajn Germanajn samideanojn. Poste ili veturis Parizon tra Lieĝo kaj Namuro. En la Franca ĉefurbo, la Esperantista grupo organizis belajn festojn pri kiuj ni jam raportis. D^{ro} Zamenhof vizitis ankoraŭ S^{ron} De Beaufront en Rouen kaj la presejon de la Presa Esperantista Societo en Parizo.

Post la Kongreso, gesinjoroj Zamenhof ripozis dum du tagoj en la kampara bieno de D^{ro} Javal kaj returne iris Varsovion tra Svisujo, kiun ili vizitis kaj kie ili renkontis S^{ron} Renard kaj kelkajn Svisajn amikojn.

La Kongreso decidis ke oni organizos kongreson ĉiujare; almenaŭ tion ĝi deziris unuanime. Por la venonta kongreso, dum 1906, oni proponis Anglujon, Germanujon aŭ Svisujon sed neniam lokon oni difinis. Aranĝo de kongreso estas tre grava afero kaj postulas ĉiutagan agadon de multaj organizantoj; monon kaj potencon helpon oni devos precipe ricevi de la Esperantistoj kaj ankaŭ de la urbanoj. Oni decidis ke la Komitato de la unua kongreso esploros la demandojn kaj tute povas decidis.

Ni intencis reprodukti kelkajn fotografiojn de la kunvenoj, sed pro diversaj kaŭzoj ni tion ne faros. Ni opinias ke, ĉar ni havas Ilustritan Esperantistan Revuon, niaj legantoj povos aĉeti kaj aboni la tre interesan gazeton « *Tra la Mondo*. » En ĝi ili trovos multajn belajn kliŝaĵojn, precipe la grupon starantan sur ŝtuparo de la Kazino; kvankam tiu grupo kalkulas nur ĉirkaŭ 250 vizaĝojn, tio estas diri kvaronon de la kongresanoj, ili renkontos en ĝi portretojn de multaj bonekonataj samideanoj: gesinjoroj Zamenhof kaj Michaux, Fraŭlinoj Pannevin, Hilda Cederblad kaj Schafer, Sinjorinoj Rosa Junck, Mudie, Rhodes, Guivry kaj Bergier, S^{roj} Rhodes, Otto Simon, Kuhl, Ostrowsky, Sam. Meyer, Boirac, Gaston Moch, Aug. Montrosier, Bolingbroke Mudie, D^{ro} Javal, Grabowsky, generalo Sebert, Abato Peltier, pastro Schneeberger, niaj Belgaj amikoj Ed. kaj Raym. Van Melckebeke, Seynaeve, Van der Biest, Witteryck k. t. p.

Kelkaj centoj da ĉiutagaj ĵurnaloj raportis pri la Kongreso kaj ĉiuj Esperantistaj revuoj konkuris por la plej plena raporto. Se niaj legantoj estas scivolaj, ili renkontos en nia gazetaro multon da interesaj artikoloj. La grupo de Boulogne intencas eldoni specialan libron kun ĉiuj ĉefaj raportoj. Unuanime la Esperantistaro gratulis tiun ageman grupon kaj ĝian sindoneman prezidanton. La provizora komitato de la Belga Ligo Esperantista sendis letere sian dankon kaj siajn gratulojn al la organizantoj de tiu sukcesplena Kongreso.

Jos JAMIN.



El la parolado de D^{ro} Zamenhof.

La belega parolado, kiun eldiris D^{ro} Zamenhof en la malferma kunsido de l' Kongreso, finiĝis per impresiga preĝa alvoko, kiu tre forte kortuŝis la audantaron kaj kiun ni plezure konigas al niaj legantoj:

« En tiu ĉi solena momento mia koro estas plena de io nedifinebla kaj mistera kaj mi sentas la deziron faciligi la koron per ia preĝo, turni min al ĉiu plej alta forto kaj alvoki ĝian helpon kaj benon. Sed tiel same kiel mi en la nuna momento ne estas ia naciismo, sed simpla homo, tiel same mi ankaŭ sentas, ke en tiu ĉi momento mi ne apartenas al ia nacia aŭ partia religio, sed mi estas nur homo. Kaj en la nuna momento staras inter miaj animaj okuloj nur tiu alta morala Forto, kiun sentas en sia koro ĉiu homo, kaj al tiu ĉi nekonata Forto, mi turnas min kun mia preĝo:

Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,
Fortego, la mondon reganta,
Al Vi, granda fonto de l' amo kaj vero
Kaj fonto de vivo konstanta,
Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
Sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,
Al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu reĝas,
Hodiaŭ ni preĝas.

Al Vi ni ne venas kun kredo nacia,
Kun dogmoj de blinda fervoro;
Silentas nun ĉiu disput' religia
Kaj regas nur kredo de koro.
Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala,
Kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala,
Ni staras nun, filoj de l' tuta homaro
Ĉe Via altaro.

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,
Sed ĝi sin dividis batala;
Popolo popolon atakas kruele,
Frat' fraton atakas ŝakale.
Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera,
Aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera,
Redonu la pacon al la infanaro
De l' granda homaro!

Ni juris labori, ni juris batali,
Por reunuigi l' homaron.
Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali,
Sed lasu nin venki la baron;
Donacu Vi benon al nia laboro,
Donacu Vi forton al nia fervoro,
Ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj
Nin tenu kuraĝaj.

La verdan standardon tre alte ni tenos:
Ĝi signas la bonon kaj belon.
La Forto mistera de l' mondo nin benos,
Kaj nian atingos ni celon.
Ni inter popoloj la murojn detruos,
Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos
Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
Ekregos sur tero.

Kunuigu la fratojn, plektigu la manojn...
Antaŭen kun pacaj armiloj!
Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj,
Ni ĉiuj de Di' estas filoj.
Ni ĉiam memoru pri bon' de l' homaro
Kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro,
Al frata la celo ni iru obstine
Antaŭen, senfine!



DIVERSAĴOJ.

Kongreso de Tutmonda Ekonomia Plivastigo. — Tiu kongreso okazis en Mons de l' 24^a ĝis la 28^a de Septembro kaj kunvenigis tre grandan nombron da eminentaj ekonomiistoj kaj esploristoj. Inter la multaj decidoj faritaj de tiu grava kongreso, du estas speciale atentindaj. Unue, la polusaj esploristoj, ĉeestantaj ĉe la kongreso, decidis organizi ne plu naciajn sed internaciajn esploradojn de l' polusoj: ĉiuj forestantaj esploristoj sendis sian konsenton pri tiu projekto; en speciala kunveno, okazanta ĉe la kongreso, decidis organizi oni decidis pri la praktika organizacio de tiuj esploradoj. Dua grava decido estis la fondo de internacia organizacio de Etnografio, kun Centra Oficejo en Bruselo: inter la tri membroj de tiu Centra Oficejo, ni plezure vidis la nomon de nia amiko, Kom^o Lemaire, kies etnografiaj laboroj estas tre ŝatataj. Tiel, pli kaj pli la homoj detruas kaj disjetas la artefaritajn barilojn kiuj ilin disigas; internacieco vere frata enpenetras ĉiujn iliajn entreprenojn kaj laborojn, sed ve! ili ankoraŭ malŝatas la necesan, la nepre necesan kondiĉon por vera, efika internacieco: komunan helpan lingvon. Kiu povos diri al ni kiom da malhelpoj kaj senutilaj laboroj alportas al tiuj internaciaj oficejoj la senfortiganta diverseco de l' lingvoj? Kaj kiamaniere interkompreniĝos la ĉiulingvaj esploristoj kiuj baldaŭ enŝipiĝos, kune veturonte al la misteraj blankaj polusoj? Antaŭ ili staras la mirinda interkomprenilo, kiu tiel multe faciligus ilian pezan taskon: ĉu ili rifuzos ĝin? Aliloke ni raportas pri la pledado por Esperanto kiun eldiris en tiu kongreso S^{ro} Kom^o Lemaire.

Beethoven. — La sorto donacis strangan, tute apartan karakteron al la genia, supernatura muzikisto kiu, kun Bach, Mozart, Wagner, Brahms, levigis la muzikarton ĝis neatentinda, nehomaj altaĵoj. La fama kreinto de l' naŭ simfonioj posedis tre amegan koron, kiu tre profunde impresiĝis je l' sentado de l' amikeco kaj de l' amo, sed, tre suspektema, tre kolerema, li subite detruis kaj forĵetis la plej karan amikan ligan, pro ia neatentinda, plej ridinda kaŭzo: tio daŭris ĝis la sekvanta tago kaj tiam, akre bedaŭrante sian faron, li petis pardonon per plej amika, karesplena letero.

Li estis tre aŭtoritata kaj, kiam oni persiste kontraŭdiris al li, li rapide kaj timinde ekkoleris. Lia amiko kaj instruato, Ries, rakontas amuzan ekzemplon de tiu koleremo. Ian tagon, kiam Ries tagmanĝis kun sia glora sed malriĉa majstro en Viena trinkejo: « *La Cigno* », la kelnero alportis pladon kiun ili ne mendis. Tiu eraro kaŭzis interdisputadon kaj, ĉar la kelnero tute neklere argumentis, Beethoven subite ekkolerigis kaj, ekpreninte la pladon, ĝin li renversis sur la kapon de l' malfeliĉa disputemulo. Estis spicaĵo laŭ la Viena modo, aranĝita kun granda kvanto da dika, kolorita saŭco. De l' kelnera vorto, la densa fluidaĵo defluis per zigzagantaj riveretoj laŭlonge de la vizaĝo, eniĝante en la okulojn, ĉirkaŭirante la nazon kaj degutante de l' lipharaj kaj barabaj haroj per brilaj diverskoloraj gutoj. La kompatinda kelnero, blindigita, havante multajn pladojn en la manoj, povis uzi nur sian langon: li elpuŝis ĝin plej longe, turnis, returnis kaj movis ĝin ĉi-flanken, vane klopodante kontraŭstari la saŭcan defluadon, dum Beethoven, stariĝinte, senkompate kaj indigne daŭrigis la koleran diskutadon kaj ree subakvigis la malfeliĉulon per torento de elokventeco. Senfina ridego ekkaptis la tutan trinkejon, antaŭ tiu spektaklo inda inciti la talenton de ia Hogarth aŭ de ia Cruikshank.

Eble multaj inter niaj belgaj amikoj nescias ke tiu dia artisto, kies lastaj majstraĵoj, sendube neniam superotaj, alti-

FRANCA=FLANDRA FAKO.

Au glorieux Auteur de l'Esperanto, le Dr Zamenhof, que le Gouvernement Français vient de nommer Chevalier de la Légion d'Honneur, « La Belga Sonorilo » présente ses sincères félicitations.

Ligue et Journal. — Nous insistons vivement pour que tous nos amis comprennent qu'il est de leur devoir de soutenir par leur modeste obole les deux organismes qui dirigeront désormais la lutte pour l'Esperanto en Belgique. A ceux qui ne redoutent aucune charge, qui s'imposent volontiers toutes les fatigues, que nos amis accordent au moins et sans hésiter la minime rétribution que nous leur demandons. Le Belge, dit-on, refuse aux belles causes ce qu'il consacrerait au centuple aux plus frivoles amusements. Nous au moins, Espérantistes, qui poursuivons un but si hautement humanitaire, ne justifions pas cette décourageante parole.

Le journal dont les charges, par suite de l'abstention de trop nombreux amis ainsi que des améliorations et modifications que nous y apportons, sont devenues très lourdes, augmente quelque peu le prix de l'abonnement : celui-ci sera désormais de 4 fr. par an (5 fr. avec inscription à la Ligue). Nous prions nos amis d'envoyer sans tarder à l'Administration du journal la minime somme de 5 fr. ou d'en permettre la perception par quittance postale. Après l'apparition du 2^{me} numéro, une quittance postale sera présentée à tous nos abonnés. Nous espérons qu'ils lui réserveront un bon accueil.

Notes en marge de l'Esperanto.

Trois lignes d'introduction. — Le Congrès de Mons et le vœu du Commandant Lemaire. — L'activité volapükiste.

